5(183)
2021

# Apudvistula Bulteno

## de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Zygmunt Ficek

### Jednak twe ciało

Jednak twe ciało odeszło, lecz pozostał
jego ból, który nie zawisł nad nami
ani nie zamieszkał w kącie. Znalazł.
On zawsze znajduje
swojego nosiciela.

Zaszywa się pod skórą,
przeszywa kość do szpiku.
Zda się być związany z tobą cieleśnie,
ale to tylko złudzenie. Uwolniony od ciebie
trwa i znajduje swoją ciepłą zatokę
pełną pokarmu. Oderwany od wszelkiej żywej
tkanki przetrwa, by znowu ją przeniknąć,
zatrwożyć,

obnażyć do kości nieśmiertelny
grymas śmierci.

tradukis Lidia Ligęza

### Tamen via korpo

Tamen via korpo foriris, sed restis
ĝia doloro, kiu nek ekpendis super ni
nek ekloĝis en angulo. Ĝi trovis.
Ĝi ĉiam trovas
sian portanton.

Ĝi kaŝas sin sub la haŭto,
trapenetras la oston ĝis la medolo.
Ĝi ŝajnas esti ligita kun vi korpe,
sed tio nur iluzio. Ĝi liberigita de vi
daŭras kaj trovas sian varman golfon
plenan de nutraĵo. Deŝirita de ĉia viva
histo transdaŭros, por denove ĝin
trapenetri, timigi,

nudigi ĝis la osto senmortan
grimacon de la morto.

### Zanim ona nadejdzie

mój za-pan-brat nie pyta
dlaczego właśnie ja

skupia się by nie wyć
z bólu
wie że siostrą bólu
jest śmierć że ma okazję
pod jej nieobecność na chwilę
zajrzeć do jej pokoju

zanim ona nadejdzie i będzie zmuszony

### Antaŭ ol ŝi venos

mia frato-kunulo ne demandas
kial ĝuste mi

li koncentriĝas por ne hurli
pro la doloro
li scias ke fratino de la doloro
estas morto, ke havas la okazon
dum ŝia neĉeesto por momento
enrigardi en ŝian ĉambron


antaŭ ol ŝi venos kaj li estos devigota

Krakova Societo ESPERANTO kun tristo informas, ke mortis
s.†m.

**Zbigniew Warmuz**

(6.06.1924 – 7.06.2021)
fervora esperantisto, emerito, eksa ĉefa teknologo industria,
eksa prezidanto de PEA-Filio en Krakovo, muzikinstruisto, estro de esperanta koruso „Kamea“, fondinto de Estrada Esperanto-Ensemblo kaj fondinto de Esperantista Fondaĵo Kultura.
La funebra entombigo okazis en Krakovo, sur tombejo Batowice, 14.06. 2021 j., je la 12:20 h.

Aro de Geamikoj kaj Samideanoj



ZBIGNIEW **WARMUZ** naskita en Krakovo krom la fakaj vivo, multe okupiĝis pri muziko. Lia unua amo estis violono, li ankaŭ ludis gitaron, saksofonon kaj klavar-instrumentojn.

Li estis aŭtoro de tekstoj, poeto kaj komponisto. Maria Warmuz, lia patrino fondis en la jaro 1972 esperantan koruson „Kamea”, kiun de la 1979 jaro art-gvidis Zbigniew. La ensemblo agis sukcese, la riĉa repertuaro esperant- kaj pollingva kontentigis gustojn de multaj personoj. "Kamea" lanĉis verkojn klasikajn, popolajn, kaj popularajn. Zbigniew Warmuz verkis multe da propraj tekstoj al propraj melodioj. Li volonte kunlaboris kun poetino kaj art-pentristino Krystyna Jordan. Kompetente li instruis la anojn de ensemblo kanti kaj ludi. Ĉar la ensemblo multe kantis esperantlingve li fariĝis la sperta instruisto de Esperanto por anoj de "Kamea". Por tiuj, kiuj deziris lerni Esperanton li preparis deklecionan lernolibron, facilan kaj agrablan por uzi. Dum multaj jaroj de ekzisto de la ensemblo aktivis en ĝi multaj personoj, kiuj kun la plena konvinko partoprenis en la laboroj de ĉi tiu amatora koruso. Ili ĉiuj kun agnosko diradis pri la agado de la gvidanto.

Zbigniew precipe ŝatis montoj, do li ofte organizis feriadojn por la tuta ensemblo kaj aliaj esperantistoj en Zawoja, Piwniczna kaj Muszyna.

Ĝis la fino de la vivo li estis fervore laboranta ĉefo de la ensemblo.

Jen unu el dulingvaj kantoj de "Kamea". Vortoj kaj muziko – Zbigniew Warmuz.

### Jaskółeczka

Jaskółeczko czarna, śmigły lot jest twój!
Dola ma cygańska, dola moja marna...
Daj mi, jaskółeczko, przestwór lotów swój!
    Śmignę ja w górę, uniknę rozpaczy,
    w innym już blasku świat promienny
    mnie zobaczy.
    W barwy tęczowe włosy przystroję,
    zrzucę ubogi strój.
    La, la, la...
Powiedz, jaskółeczko, czy znasz taki kraj
gdzie znikną cierpiena, spełnią się marzenia?
Bym tam poleciała, swe skrzydełka daj
    Śmignę ja w górę...

### Hirundeto

Hirundeto nigra, svinge flugas vi!
Pro sorto cigana revo mia vana;
Donu aer-spacon liberan al mi!
Supren mi fuĝos de malespero,
al mond' prezentos la novan,
brilan aperon,
per ĉielarko harojn ornamos,
vesto riĉigos min
La, la, la...
Diru, hirundeto, ĉu ekzistas land',
lando sen sufero; diru al mi veron,
por ke tien flugu mi al monda rand'!
Supren mi fuĝos...

Anoj de Krakova Societo Esperanto

Krakova Societo ESPERANTO kun la tristo informas,
ke 22.08.2021 j.post la kurta malsano travivinte 90 jarojn
mortis nia kara amikino

s.†m.

**Stanisława Szostak**

naskita **Kusek**

fervora esperantistino, anino de Krakova Societo ESPERANTO.
La funebra entombigo okazis en Krakovo
sur Batowice-Tombejo 25.08. 2021 j. je la 9:00 h.

Aro de la Geamikoj kaj Samideanoj



STANISŁAWA **SZOSTAK** dum la tuta faka vivo laboris en ZREMB (Renoviga Institucio pri Konstru-Maŝinoj) kiel ĉefa librotenistino kaj sperta librotenistino por diversaj institucioj.

En nia societo Stanjo estis vere ŝatata pro la kvieto, la serena karaktero kaj la humorsento. Ekzemple kiam iu rimarkis, ke ŝi tro multe sukerumas, ŝi respondis: "la organismo tion postulas".

Ŝia esperanta vivo konsistis el du etapoj. En la kvindekaj jaroj ŝi finis Esperanto-kursojn de unua kaj dua gradoj gvidataj de prof. Mieczysław Sygnarski. Ŝi tiam partoprenis en multaj Esperanto-aranĝoj, ankaŭ eksterlandaj.

Poste, krom la intensa faka laboro ŝi koncentriĝis je la familia vivo, kiel la sindona edzino kaj patrino de unusola filo Krzysztof.

La reveno al Esperanto okazis post morto de la amata edzo en la jaro 2006. Kun iu eĉ emfazo Stanjo tiam pruvis, ke Krakova Societo esperanto ebligis al ŝi reveni de la despero al la normala vivo. Ŝi aktive partoprenis kunvenojn de KSE, plenumis dum multaj jaroj postenon de kasistino, kion plifaciligis al ŝi la fakaj okupoj laŭ la natura akurateco. Stanjo revenis al esperantaj aranĝoj – landaj kaj al eksterlandaj esperantaj vojaĝoj. Ŝi multe helpis kiel volontulino ĉe laboroj de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, en la jaro 2009.

Ŝi ĉiam alte taksis valorojn de la naturo. En impresoj el diversaj kuraclokoj publikigitaj en "Apudvistula Bulteno" ŝi ĉiam substrekadis belon de la ĉirkaŭanta mondo.

Stanjo estis unu el aŭtorinoj de la komuna traduko (poem-volumo de Danuta Perier-Berska, Matenmanĝo sur Venuso kaj aliaj versaĵoj, Krakovo 2008). Jen la fragmento, kiu konsentas kun la mondkoncepto de nia amikino:

Mastrino subtatra,
Sinjorin' orhara,
antaŭ Vi genuas
paŝtistoj, ŝafaro.

Por Vi la poemojn
zume kantas griloj
kaj vent' ŝiras bidojn
el ruĝfruktoj brilaj.

Por Vi kun lun', steloj
nebula vualo,
noktoj ĉe muziko,
Guzlo de Sabalo.

Al Vi ĉion donos
kruda montarano,
por li pli ol vivo
gravas al Vi amo.

Amikoj de Krakova Societo ESPERANTO

Krakova Societo ESPERANTO kun tristo informas,
ke la 21-an de aŭgusto 2021 j. mortis post la longa grava malsano
travivinte 85 jarojn nia kara amiko

s.†m.

**Andrzej Feuer**

Lekcianto de Mineja-Fandeja Akademio,
ano de Krakova Societo ESPERANTO.
La funebra diservo kaj la entombigo okazis en Krakovo,
sur Rakowice-Tombejo, 30.0811. 2021 j., je la 10:20 h.

Aro de Geamikoj kaj Samideanoj



ANDRZEJ **FEUER** (1935 – 2021) studis fizikon en Jagelona Universitato. Fiziko fascinis lin dum la tuta vivo. Li interesiĝis ankaŭ pri historio, geografio kaj astronomio. Sian vastan scion li volonte transdonadis al la proksimuloj kaj al studentoj dum la faka laboro. Li laboris en Mineja-Fandeja Akademio, en Fakultato pri Fiziko kaj Informatiko Aplikata dum la jaroj 1968 ĝis 2000.

Li estis persono havanta multe da interesiĝoj kaj pasioj per kiuj povis efike kontaĝi la familion kaj konatojn. Elokventa, sprita, ĉiam ema por serĉi li estis tre ŝatata en ĉiu societo. Aktive li partoprenis en esperanta kluba vivo, en aranĝoj kaj ekskursoj de nia medio.

Li estis poligloto konanta sep lingvojn. Ne rare prelegante dum klubaj kunvenoj li utiligis ne nur Esperanton, sed ankaŭ germanan, anglan kaj eĉ hungaran. Liaj rimarkeblaj ecoj estis kvieto kaj pacienco, kiujn li utiligadis dum diversaj ludoj ekz. ŝakoj kaj briĝo.

Li estis talenta epigram-verkisto. Pri sia verkado li mem skribis en Esperanto aplikata, Sciencaj Kajeroj n-ro 1 en la propra teksto „Ju pli ŝerce des pli profunde, serioze kaj stabile“ jene: „Kial ni iam ekamis ian fremdan lingvon, se ni estis tiom bonŝancaj, ke ni ekamis? Certe ne pro devo kaj devigo. Plej ofte pro la sento de plezuro lerni. Sube mi prezentas mnemoteknikajn versaĵojn, el kiuj mi ludas kvazaŭ sur du kordoj – la pola lingvo kaj esperanto. Ili povas kapti la atenton kaj resti en la memoro.

Rzekł artysta: zawsze warto
Wspierać sztukę zwaną **arto.**

Hak jest wbity zbyt wysoko;
W esperancie zwą go **hoko.**

Dziadek biega całkiem żwawo
W esperancie zwą go **avo.**

Droga dobra dla rekruta
Ma być stroma, czyli **kruta.**

Kabanosy jadam rano
w chacie, którą zwą **kabano.**

Czy przyszedłeś do kolegi,
żeby czytać czyli **legi.**

Przegoniono stąd intruza,
Choć był szczwany, czyli **ruza.**

Akord, który zwą **akordo**
Gram na strunie zwanej **kordo.**

Rzuca pety i swawoli,
A swawolić to **petoli.**

Ominiemy bokiem Busko,
Tam zasadzka jest – **embusko**.

Amikojoj de Krakova Societo ESPERANTO